

JESUO KRISTO LA UNIVERSALA REĜO – la 23an de Novembro 2014

LI EKSIDOS SUR SIAN GLORAN TRONON KAJ APARTIGOS ILIN LAŬ DU GRUPOJ. – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 25, 31-46

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Kiam la Filo de la homo venos en sia brilego kun ĉiuj siaj anĝeloj, Li eksidos sur sian reĝan tronon. Ĉiuj popoloj de la tero estos kolektataj antaŭ Lin, kaj Li apartigos ilin laŭ du grupoj, kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn disde la kaproj: Li starigos la justulojn ĉe unu flanko, kaj la maljustulojn ĉe alia flanko.

Tiam diros la reĝo al la justuloj: ‚Venu, vi, kiuj estas benataj de mia Patro; eniru la regnon preparitan por vi ekde la komenco de la mondo. Ĉar Mi malsatis, kaj vi donis al Mi manĝi, Mi soifis, kaj vi donis al Mi trinki; Mi estis fremdulo, kaj vi gastigis Min; nuda, kaj vi donis vestojn al Mi; Mi estis malsana, kaj vi flegis Min; Mi estis en malliberejo, kaj vi vizitis Min.‘

Tiam diros al Li la justuloj: ‚Sinjoro, kiam ni vidis Vin malsata kaj satigis Vin, aŭ soifanta kaj ni donis al Vi trinki? Kiam ni vidis Vin fremdulo kaj gastigis Vin, aŭ nuda kaj donis al Vi vestojn? Kaj kiam ni vidis Vin malsana aŭ en malliberejo, kaj vizitis Vin?‘

La reĝo respondos: ‚Vere Mi diras al vi: kiam ajn vi faris tion al unu el ĉi tiuj miaj malgrandaj fratoj, tion vi faris al Mi.‘

Tiam Li diros al la maljustuloj: ‚For de Mi vi malbenitaj, en la eternan fajron, kiu estis preparita por la diablo kaj liaj similuloj. Ĉar Mi malsatis, kaj vi ne donis al Mi manĝi; Mi soifis, kaj vi ne donis al Mi trinki; Mi estis fremdulo, kaj vi ne gastigis Min; nuda, kaj vi ne donis vestojn al Mi; malsana kaj en malliberejo, kaj vi ne vizitis Min.‘

Tiam ankaŭ ili respondos: ‚Sinjoro, kiam ni vidis vin malsata, soifanta, fremda, nuda, malsana aŭ en malliberejo, kaj ni ne servis al vi?‘

Tiam la reĝo respondos al ili: ,Vere Mi diras al vi: kion ajn vi ne faris al unu el ĉi tiuj malgranduloj, tion vi ne faris al Mi.’

Kaj ili iros en la eternan punon, dum la justuloj en la eternan vivon.”

En la evangelio de Mateo kiun ni komentas, ĉapitro 25, versikloj 31-46, oni raportas pri la lasta grava instruo de Jesuo. Por tiu instruo Jesuo referencas al bildo konata en la hebrea mondo kaj ni ĝin trovas en Talmudo, kie legeblas ke *en la transmondo la Sanktulo, kiu estas benata, prenos la rulaĵon de Torah, La Leĝo, ĝin metos sur siajn genuojn kaj diros: "Kiu ĝin prizorgis venu kaj tiu ricevos sian repagon”.*

Nu Jesuo prenas kiel modelon tiun priskribon, sed ŝanĝas ĝian enhavon. Tio kiu determinas la realigon de la individuo ne estas la rilato kiun li havis kun la leĝo, kun Dio, sed la rilato kiun li havis kun la aliaj personoj. Kial tio? Kun Jesuo, Dio – kiel priskribas Mateo komence de sia evangelio – estas la Dio kun ni. Kun Jesuo do la direkto de la homaro ne plu estas al Dio, sed kun Dio kaj kiel Dio al la homaro.

La Dio de Jesuo neniam postulos ĉu oni kredis je li, sed ĉu oni amis kiel li.

Ni do vidu la instruon de Jesuo. Jesuo prezentiĝas kiel la filo de la Homo kiu aperas en sia gloro, kaj dividas la paganajn popolojn. Ne estas iu lasta juĝo. Israelo estis jam prijuĝata en tiu ĉi evangelio, tio estas la juĝo de tiuj kiuj ne konis Dion.

Nu, *kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn disde la kaproj* li apartigos la personojn. Samkiel la kamparano apartigas la bonajn disde la putraj fruktoj, samkiel la fiŝkaptisto en tiu ĉi evangelio kapablis distingi la bonajn fiŝojn kaj flankenlasi la putrajn, tiel la Sinjoro tuj rekonas tiun kiu direktis sian vivon por la bono de la aliaj.

Tiam diros la reĝo al la justuloj: ,Venu, vi, kiuj estas benataj de mia Patro; li ilin benas ĉar ili estas tiuj kiuj realigis la projekton de Dio por la

homaro. Kaj poste li listigas ses agojn rilatajn al bezono, sufero, neceso flanke de la homaro kun la respondojn al ili donitaj.

El tiuj ses agadoj neniuj rilatas la sintenon al la religio, neniuj rilatas al la konduto al Dio, sed tiu al la bezonoj de la bezonhavigoj de la homaro. Tio kiu permesas la eternan vivon ne estas do la religia konduto, sed la hom(am)a konduto.

Tiu kiu distancigas en tiuj ĉi ses situacioj estas la prizonulo. *Mi estis en malliberejo, kaj vi vizitis Min.* Je tiu tempo la prizonulo ne vekis kompaton, sed nur malestimon. Iri viziti prizonulon signifas ankaŭ lin nutri, ĉar la karcergardistoj tute ne prizorgis lian nutradon. La surprizo de tiuj personoj al kiuj Jesuo diris ke ili faris ĉiujn tiujn aferojn al li... *Sinjoro, kiam ni vidis Vin malsata kaj satigis Vin, aŭ soifanta kaj ni donis al Vi trinki? Kiam ni vidis Vin fremdulo kaj gastigis Vin, aŭ nuda kaj donis al Vi vestojn? Kaj kiam ni vidis Vin malsana aŭ en malliberejo, kaj vizitis Vin?*

Kaj jen la respondo de Jesuo: *"Vere Mi diras al vi: kiam ajn vi faris tion al unu el ĉi tiuj miaj malgrandaj fratoj..."* Kiu estas la malgrandaj fratoj? Ili estas la nevideblaj de la socio, estas la bezonhavigaj, la flankenmetitaj, la ekskluditaj. Nu Jesuo tion konsideras kiel faritan al li. Tio ne signifas ke oni devas ami la aliajn pro Jesuo, sed ilin ami kun Jesuo kaj kiel Jesuo.

Kaj jen la alia flanko de la afero: *Tiam Li diras al la maljustuloj: „For de Mi vi malbenitaj,* Gravas substreki tion. Dum Jesuo antaŭe vokis la justulojn "benataj de mia Patro", nun ilin vokas "malbenitaj" sed ne de sia Patro; Dio ne malbenas, Dio estas nur beno. Tiu malbeno – estas la nura fojo en kiu ĝi aperas en la evangelio – revokas la unuan malbenon ĉeestantan en la Biblio, en la libro de la Genezo, ĵetita al Kaino kiu murdis sian fraton.

Jesuo estas do tre rigora. Ne proponi helpon, ne respondi al la bazaj bezonoj, al la suferoj, al la necesoj de la aliaj, tio samvaloras al murdo. Ili estas malbenataj ne de Dio, sed ilia egoismo, ilia fermiteco al la bezonoj de la aliaj, iele ilin malbenis. Kiu ajn sin fermas al la vivo, tiu sin malbenas.

"Malbenitaj en la eternan fajron," la eterna fajro signifas tiun kiu detruas ĉion, *"kiu estis preparita por la diablo"*. Lastan fojon en tiu ĉi evangelio aperas la diablo en sia fina detruo, tio signifas lian definitivan malvenkon, ĉar ĝi iras en la eternan fajron kiu bildigas tion kio detruas ĉion, *"kaj liaj similuloj"*, tio estas liaj senditoj, tiuj kiuj iĝis mortigiloj. Tiujn personojn Jesuo ne riproĉas ĉar ili agis fie, sed ili iĝis mortigiloj ĉar ili ne agis bone en okazoj de neceso, en okazoj de pretervivo.

Ankaŭ tiuj respondas – kaj tion ili faras resumante ĉiujn situaciojn de malkomforto de la homaro, la malsato, la soifo, sed gravas la fino “*kaj ni ne servis al vi?*” kion la justuloj ne diras. Ili kompreneble kredas ke ili servis la Sinjoron, ke ili Lin servis per la liturgio, per la kulto, ili ne komprenis ke kun Jesuo Dio ne postulas esti servata, sed li kiu estas Dio sin metas je la servo de la homoj por ke la homoj kun li kaj kiel li metu sin je la servo de la aliaj.

Kaj jen la verdikto de Jesuo: *Vere Mi diras al vi: kion ajn vi ne faris al unu el ĉi tiuj malgranduloj, tion vi ne faris al Mi*”. Do, ankoraŭfoje, tio kiu decidigas la sukceson en la vivo kaj la konduton de la persono ne estas la rilato kun Dio, sed la rilato kun la aliaj. Kiam oni fermiĝas al la aliaj, oni fermiĝas al Dio.

Kaj ili iros en la eternan punon, tiu estas bildo eltirita de la libro de profeto Daniel, ĉapitro 12, versiklo 2, kiu signifas la definitivan fiaskon de propra vivo. La vorto tradukita per “torturo” e la greka signifas “mutili”. La puno do ne ŝuldiĝas al la Patro, sed ili mem sin punis pro la fakto ke la lia estas mutilita vivo, vivo kiu ne atingis la plenecon.

Ne temas do pri puno, sed pri kompleta fiasko, tiu kiu en la Apokalipso estos difinita “dua morto”. Sed la evangelio finiĝas per pozitiva bildo, “*dum la justuloj en la eternan vivon*”. Tiuj kiuj vivis farante la bonon, komunikante vivon al tiuj kiuj ĝin bezonis, tiuj realigis sian ekziston kaj precipe realigis la planon de Dio pri la homaro.